

BRAZILA ESPERANTISTO

70-a Jaro

Januaro - Marto 1976

N-ro 742-744

1.^a Jaro

Aprilo

N.º 1



BRAZILA



REVUO ESPERANTISTA

Elirante ĉiumonate — Aparecendo mensalmente

REDAKCIO

Alberto Alvares F. Vieira — Reynaldo F. Geyer — Everardo Backheuser



ENHAVO (SUMMARIO)

- | | |
|--|--|
| Portreto (retrato) de Dro Zamenhof. | Esperanto en la Telegrafo (o Esperanto no Telegrapho). |
| Al nia legantaro (Aos nossos leitores). | Konsuloj kaj konsulejoj (Consules e consulados). |
| De Babel ao Esperanto — Medeiros e Albuquerque. | Brazila Kongreso de Esperanto (Congresso brasileiro de Esperanto). |
| Kroniko (Chronica). | Murillo Furtado. |
| — Brazila Klubo «Esperanto». | Kanto de l'ekzilo (Canção do Exílio) — Gonçalves Dias (P. V. Lorenz, tradukis) |
| — G. E. Suda Stelaro. | Esperanto en Fremdlando (O Esperanto no estrangeiro). |
| — Esperanta Societo Sud-Rio Granda. | Humuraĵoj (Humorismos). |
| — Laboristara Esperantista Grupo. | |
| — G. E. Verda Stelo. | |



ELDONO DE

M. PIEDADE KAJ K.^{ia}

Rua da Assembléa, 46 — Rio de Janeiro

== BRAZILUJO ==

Apoio

Necessário

Januário - Março 1976

70-a Jaro

N-ro 742-744

Brazila Esperantisto
("O Esperantista Brasileiro")

Quando, em 1907, se realizou o I Congresso Brasileiro de Esperanto, havia 13 clubes esperantistas em várias cidades brasileiras.

Sentindo a necessidade de um órgão coordenador e de âmbito nacional, os esperantistas, que participaram do Congresso, decidiram fundar a Liga Brasileira de Esperanto.

Com a ajuda financeira destes clubes, que anualmente filiavam seus sócios, a Liga pôde publicar material de informação, surgindo "Que é o Esperanto", "Tra la Mondo", "Setenta Anos de Língua Internacional", etc.

Além dos cursos em classe, a Liga criou cursos por correspondência, nos níveis elementar, superior e magistral, racionalmente planejados. É de se assinalar que muitos alunos dos cursos por correspondência fundaram clubes em suas cidades, contribuindo para a divulgação do Esperanto.

Por iniciativa da Liga foram publicadas obras literárias e didáticas. Cite-se, entre outras, "Curso de Esperanto em 20 Lições", com 7 edições e alguns milhares de exemplares vendidos, em nosso país e em Portugal.

Graças também às contribuições anualmente remetidas pelas instituições filiadas a Liga formou um invejável Serviço de Livros que põe à disposição dos sócios as principais obras editadas no exterior. É interessante mencionar que o Sócio, ao receber o livro encomendado, não faz idéia das dificuldades que a Liga enfrentou para servi-lo; elas vão desde a liberação dos pacotes de livros na repartição competente ao pagamento em moeda estrangeira, sujeito a variações cambiais.

Esse trabalho sério, realizado pela Liga, contribuiu para angariar a simpatia de brasileiros ilustres, que em diversas ocasiões não negaram apoio à nossa causa.

Indubitavelmente, estas atividades ao longo de quase setenta anos não seriam possíveis não fosse a ajuda financeira dos esperantistas e principalmente dos clubes filiados.

Por esse motivo, no ano passado, em circulares e em artigos publicados nesta revista, revelamos as dificuldades da Liga e convidamos os esperantistas à adesão, única solução para consolidarmos o Movimento nacional e para não perdemos as conquistas arduamente conseguidas.

Infelizmente, à exceção de uma minoria compreensiva e fiel, a maior parte dos esperantistas não compreendeu ou ignorou nosso apelo, que mais uma vez renovamos, lembrando que não há esperantista brasileiro que não tenha batido à porta da Liga para obter um serviço.

E esta porta há que se manter aberta.

Oficiala organo de **Brazila Esperanto-Ligo**, societo de publika utileco, laŭ registara dekreto n-ro 4.356, 26-10-1921.

Respondeca redaktoro: Luiz A. B. Martins

Redaktoroj: Jorge C. Oliveira, Joel Manso, Floriano Pessoa.

Administracio kaj Redakcio:
Praça da República, 54, 2.º
20.000 Rio de Janeiro - RJ, Brazilo

Senpaga por anoj de B.E.L.
Eksterlande: 15 respondkuponoj.

Liga Brasileira de Esperanto

Taxas dos Cursos

Curso Elementar — Contribuição única: **140,00**
50% desse valor deverá ser remetido com o pedido de inscrição, o restante com a remessa da 6.ª lição.

Curso Superior — Contribuição única: **220,00**
50% desse valor deverá ser remetido com o pedido de inscrição, o restante, com a remessa da 10.ª lição.

Curso Magistral — Contribuição única: **330,00**
50% desse valor deverá ser remetido com o pedido de inscrição, o restante com a remessa da 15.ª lição.

Quota anual de adesão à Liga Brasileira de Esperanto 1975

		Cr\$
M 1	além das vantagens de sócio recebe o Brazila Esperantisto	50,00
M 2	recebe o mesmo que o M 1. Paga uma quota mais alta para auxiliar a B.E.L. e o movimento	100,00

Essas quotas correspondem ao ano civil.

Todas as importâncias devem ser remetidas, em cheque pagável no Rio de Janeiro, ou vale postal, em nome da **Liga Brasileira de Esperanto**: Praça da República, 54-2.º andar, 20.000 - Rio de Janeiro, RJ.

BRAZILA ESPERANTISTO

La kuranta jaro estas aparte signifa por ni, ĉar en ĝi komenciĝas la 70-a jaro de publikigado de "Brazila Esperantisto", unu el la plej antikvaj Esperanto-revuoj en la mondo, veninta tuj post "Sonorilo", "Espero Katolika", "Esperanto", "La Brita Esperantisto" kaj "La Espero".

Nur tiuj, kiuj iam publikigis ian periodaĵon povas taksu la altan meriton de la iniciatintoj kaj redaktoroj Alberto Alvares F. Vieira, Reynaldo Geyer kaj Everardo Backheuser, kiuj dediĉis al ĝi sian tempon kaj monon.

Alberto Alvares Fernandes Vieira estis advokato en Rio de Janeiro, kaj interesigis la firmon M. Piedade & Cia. eldoni la revuon, kion ĝi faris ĝis la n-ro 7, Oktobro 1907. Li estis kunaŭtoro de la lernolibro "Gramática da Língua Esperanto" kaj Prezidanto de "Sociedade Esperantista Brasileira", en Rio de Janeiro.

La ideo fondi brazilan revuon apartenis al Reynaldo Fred Geyer, kunfondinto de la Sociedade Esperantista do Rio Grande do Sul. En 1907, li venis al Rio de Janeiro por fini en la Medicina Fakultato la kurson komencitan en Rio Grande do Sul. En 1912 Geyer fariĝis membro de la Lingva Komitato.

Everardo Adolfo Backheuser estis profesoro de geologio kaj inĝeniero; li verkis multajn librojn pri antropogeografio kaj pri lernado de geografio kaj de aliaj sciencoj en niaj duagradaj lernejoj. En 1906, li publikigis en la ĵurnalo "O País" kurson de Esperanto, kiu vekis la intereson de multaj personoj. Li estis kunfondinto de "Brazila Klubo "Esperanto" kaj de Brazila Esperanto-Ligo kaj ties unua Prezidanto.

La unua numero de nia revuo aperis kun la titolo "Brazila Revuo Esperantista"; en 1908 oni ŝanĝis la nomon al "Brazila Esperantisto", en 1938 al "O Esperantista Brasileiro" kaj fine en 1949 denove al "Brazila Esperantisto".

Ekde 1907 ĝi fariĝis oficiala organo de "Brazila Esperanto-Ligo", fondita en la sama jaro en I-a Brazila Kongreso de Esperanto.

Krom la tri cititaj, estis redaktoroj de "Brazila Esperantisto" Alberto C. A. Caetano Coutinho, J. B. Melo e Souza kaj Carlos Domingues.

Dum multaj jaroj kunlaboris en la revuo L. C. Porto Carreiro Neto, I. Gomes Braga, Daltro Santos, Nuno Baena, F. Valdomiro Lorenz kaj multaj aliaj, kiuj lasis rakontojn kaj poeziojn, originalajn aŭ tradukitajn.

Legante la tutan kolekton de nia revuo, ni konstatas, ke la semo plantita de tiuj tri karmemoraj pioniroj ne perdiĝis kaj hodiaŭ se ĝi daŭre estas modesta, sendube ĝi fariĝis grava fonto por la historio de la Esperanto-Movado en Brazilo.

La Unua Numero

La unua numero de "Brazila Esperantisto" publikigis la jenon:

Informo pri la unuaj Esperanto-klubo en Brazilo:

1. G. E. Constelação do Sul, fondita en 17-III-1906, en Campinas, SP. Prez.: João Keating; Sek.: Carlos Steventon; Kas.: Jorge Bergrem.

2. Brazila Klubo "Esperanto", fondita en 29-VI-1906, en Rio de Janeiro. Prez.: Medeiros e Albuquerque; Sek.: Hernani M. Mendes; Kas.: Honório Leal.

Tiu ĉi klubo malfermis konkurson por la traduko de la rakonteto "O Batismo" (La Bapto), de Coelho Neto.

3. Sociedade Esperantista do Rio Grande do Sul, fondita en 2-XI-1906, en Porto Alegre, RS. Hon. Prez.: L. L. Zamenhof kaj L. de Beaufront; Prez.: Cristiano Kraemer; Sek.: Reynaldo F. Geyer; Kas.: Ilídio Augusto.

Estas menciinde, ke tiu ĉi societo ricevis de Zamenhof kaj de Beaufront poŝtkarton kun jena teksto:

Varsovio, 28-X-06.

Karaj Sinjoroj!

Al la Esperanta Societo Sud-Rio-Granda mi sendas koran saluton kaj deziron de plej bonaj sukcesoj.

Via

Zamenhof

P.S. La titolon de Honora Prezidanto, afable donacita al mi de via societo, mi akceptas kun kora danko.

Louviers, 20-10-1906.

Kara Sinjoro,

Mi tutkore dankas la Esperantan Societon Sud-Rio-Grandan pro la honoro, kiun ĝi faris al mi kaj volonte akceptas la titolon "Honora Prezidanto" de tiu ĉi nova familio esperantista.

Ĝi brilege sukcesu kaj konstante pligrandiĝu en la belega tero de Brazilujo, kiun mi vizitis antaŭ multaj jaroj!

Kun amika saluto por via societo kaj vi mem.

Kore via

L. de Beaufront.

4. Laboristara Esperantista Grupo, 15-XII-1906, Rio de Janeiro. Direktoro: Francisco Ramos.

5. Grupo "Verda Stelo", 1-XII-1906, Rio de Janeiro. Prez.: Hernani M. Mendes;

LETEROJ DE LA LEGANTOJ

Antonio Lage, Rio de Janeiro, RJ: En la lastaj du jaroj la kovrilo de "B.E." aperis diverse. Persone mi preferas tiun kovrilon de la n-ro 736-738, ĉar ĝi fariĝis karakterizilo de nia revuo.

Maj. G. Silva Velho, Caçapava, SP: Gratulon pro la lasta numero (736-738) de "Brazila Esperantisto": informa, aktuala, interesa.

Luiz Alberto Coelho, Paraíba do Sul, RJ: La n-ro 739-741 de "B.E." estas aparte leginda pro la riĉa enhavo. Bonvenaj la rubrikoj "Teknikaj Resumoj" kaj "Depoimentos" Makuleto: prezmanco en la libroj recenzitaj kaj en "Anonceto" informmanco ĉu temas pri korespondpentinto aŭ korespondpetintino.

La leganto pravas. Pri la unua ni nur ne indikas la prezon, kiam la libro mankas en nia stoko; pri la dua, ni nur ne informas, kiam el la letero ricevita ni ne sukcesas scii ĉu temas pri viro aŭ virino.

Doações

Recebenos e agradecemos de:

— D-ro Elmo Pereira Nunes Cr\$ 100,00

Kas.: Raul Gitahy.

* Dank' al la klopodoj de Medeiros e Albuquerque, la brazila Registaro konsideris Esperanton klara lingvo pro la telegrafo.

* Invito al esperantistaro pro la I-a Brazila Kongreso de Esperanto, en la 12-a ĝis la 19-a de Julio 1907.

* Traduko de "Canção do Exílio" de Gonçalves Dias far de F. Valdomiro Lorenz.

* Represo de artikolo de Hernani Mendes pri "unuaj paŝoj de nia lingvo" en Brazilo, publikigita en la revuo "Renascença".

Brazila Kroniko

Minas Gerais

Juiz de Fora — S-ro Kleber Halfeld, estrano de Clube Esperantista Juiz de Fora kaj konsilanto de B.E.L., informis, ke S-ro José Francisco Marcílio Filho instruas Esperanton al 12 lernantoj ĉe Associação Cultural Brasil-Estados Unidos (Kultura Asocio Brazilo-Usono). La lecionoj okazas lunde kaj jaŭde.

— S-ro José Passini, Prezidanto de Clube Esperantista Juiz de Fora, multe laboras por Esperanto en la Federacia Universitato de Juiz de Fora (v. n-ron 718-721, Jan.-Ap. 74, B.E.). Nun li preparas magistran tezon pri Esperanto.

Rio Grande do Sul

Porto Alegre — Esperantista Societo de Porto Alegre informis, ke la 1-an de Decembro lasta ĉe "Sociedade Espírita Allan Kardec" 24 lernantoj finis la elementan kurson de Esperanto. La kurson gvidis S-ro B. Egon Breitenbach.

São Borja — La 21-an de Novembro pasinta, ĉe la Fakultato pri Filozofio en São Borja, D-ro M. Belmonte de ABreu prelegis pri Esperanto al ĉirkaŭ 100 personoj.

La prelegon ĉeestis gravaj lokaj aŭtoritatoj, inter aliaj, la Direktorino de la Fakultato Prof-ino Natércia C. Santos kaj la urbestro D-ro João Carlos Mariense Escobar.

São Paulo

Caçapava — Maj. G. Silva Velho sendis al

ni kopion de la paĝo de "Diário do Congresso Nacional" (22-X-75), kiu publikigis tekston de la Leĝoprojekto n-ro 1290 de la Deputito Freitas Nobre por la enkonduko de Esperanto kiel nedeviga lernobjekto en la duagradajn lernejojn.

Kanto de l' Ekzilo

Gonçalves Dias

Mia lando havas palmojn,
kie kantas sabia' ; (*)
birdoj, tie ĉi kantantaj,
tiel ne belsonas ja.

Kaj ni havas pli da steloj,
sur herbejoj pli da floroj,
en arbaroj pli da vivo,
pli da amo en la koroj.

Tie nokte sollevante
pli da ĝoj' mi trovas ja;
mia lando havas palmojn
kie kantas sabia' ;

Mia lando ĉarmojn havas,
kiujn mi ne trovas ĉi;
tie nokte sollevante
pli da ĝoj' mi trovas ja;
mia lando havas palmojn,
kie kantas sabia'.

Di', ne volu, ke mi mortu,
sen reveni tien, ha,
sen ekĝui la belaĵojn,
kiuj ĉi ne estas ja;
sen revidi la palmarbojn,
kie kantas sabia'.

Trad. F. V. Lorenz

(*) Sabiao estas birdo, kiu kantadas en la brazilaj arbaroj.

E k t i m o

Artur Azevedo

— Nu, kio estas al vi? . . . Kion vi sentas?
 . . . Vi estas malgaja, kiel pluva tago! . . .

— Ve al mi! Oni metis min sur la straton!

— Ĉu vi ankoraŭfoje estas maldungita?

— Ankoraŭfoje, estas vere! Vidu do, kia estas mia sorto! . . .

— Ĝi estas afero de la diablo!

— Kion vi deziras? Malbonŝanco ne min forlasas! Ĝi min ekkaptis!

— Sed rakontu al mi . . .

— Mia dunginto . . .

— Kiu el ili?

— Tiu vicgrafo.

— Ha!

— Li ordonis min kopii ian leteron, kie li skribis la vorton harmonio (*) sen h. Ĉar mi redonis al la vorto en la kopiaĵo la literon h, kiun nerefuteble rajtas la ortografia digneeco de la vorto, li koleris kontraŭ mi, ke mi kopiu tion, kio tie troviĝas, kaj ke mi donu al diablo, kion mi scias. Mi respondis al li, ke tia absurdaĵo neniam aperos en mia skribaĵo. Li nomis min stultulo. Mi nomis lin besto.

— Besto?

— Besto!

— Ho! ankaŭ vi! . . .

— Li metis min sur la straton!

— Mi farus la samon.

— Li agis laŭ sia rajto.

— Li estas tute prava.

— Li pravas, mi ĝin ne malkonsentas. Mi devis pli respekti mian dunginton ol la gramatikon. Li donis al mi monon por laboro; gramatiko neniam enspezigis ion al mi.

— Tian konsideron vi antaŭe devis fari. . .

— Vidu! Mi oferis pro ia h, pro ia mizera h, krom ĉio muta, mian ripozon, mian bonstaton, mian panon! Kaj sincere: kian utilon havas la litero h ĉe la vorto harmonio? S-ro Vicgrafo preferas la fonetikan ortografion . . . Kiu ordonis min afekti kleregulo? Nu, admonu min, nomu min infano, tiru miajn orelojn, punu min per dekduo da frapoj per manbatilo!

Tiu dialogo okazis inter mi kaj Braŭlio iun vesperon, kiam mi rekontis lin malgaja kaj senkuraĝa, sidanta sur benko en Rocio, faranta zigzagajn sur la tero per pinto de sia pluvombrelo.

Li estis junulo aĝanta tridek kaj kelke da jaroj, kiu de siaj dek kvin jaroj malavare pagis la klasikan tributon de juneco.

Li estis ĉio: pedelo, soldato, lernanto, sufloro, vendisto de loteriaj biletoj, komizo de butikoj, de mercerejo, de magazeno, de librejo k.t.p.; li lastatempe tre malfacile dungigis, kiel kontoristo-helpanto ĉe grava komercejo, en kiu, kiel supre dirite, li ĵus oferis sin pro ia muta h.

— Ĉi tiun fojon — li ekkriis —, ĵetante foren la cigaredostumpon, ĉi tiun fojon mi estas en malesperiga situacio!

— Kial?

— Mi ne havas domon, en kiu mi loĝu, nek tablon, ĉe kiu mi manĝu, nek liton, en kiu dormu!

— Ĝi estas afero de la diablo!

— Restas al mi nur unu faro . . .

— Kio? — mi demandis, ridetante. Ĉu memmortigo?

— Ne; iri loĝi kun vi.

(*) Portugallingve *harmonia*, kies *h* ne havas fonetikan valoron. — La Trad.

— Venu do.

Post kvaronhoro Braŭlio estis engastiĝinta en mia domo.

En tiu tempo mi estis sola kaj loĝis en la domo de Emerenciana, vidvina kaj jam maturaĝa, kiu luigis al mi pro malgranda prezo la vizitoĉambron rigardantan al la strato kaj du dormoĉambrojn. Unu el tiu dormejoj ekposedis Braŭlio, kiu tuj ekhavis krediton ĉe la sama restoracio, en kiu mi tag- kaj vespermanĝadis.

Kelke da tagoj post kiam li fariĝis mia gasto, Braŭlio, kiu restis plu maldungita kaj sen esperoj ricevi oficon, venis al mi, en mia ĉambro, kaj post kelkaj sentimentalaj konversacioj li diris al mi per pozitiva tono:

— Iun tagon, ŝercante, vi parolis al mi pri memmortigo . . . Ĉu vi do volas scii ion? Mi estas decidinta mortigi min!

— Ĉu vere?

— Sinmortigo estas la plej feliĉa rajto de la homo. Mi estas kreita neutila: mi devas morti!

— Mi opinias, ke vi kontraŭe devas serĉi serioze ion, kio faru vin elteni la vivon.

— Mi perdis la lastan esperon!

— Kio?

— Vidvino Emerenciana.

— Kio! nia luigantino!

— Ŝi estas vidvino ankoraŭ freŝa; ŝi havas ĉi tiun domon kaj aliajn, polisojn, kiom da ili mi ne scias, kaj pension; ŝi ja povus vidi en mi la kunulon, kiu mankas al ŝi, la administranton de siaj havaĵoj, la zorganton de siaj interesoj . . .

— Kio! Ĉu vi intencas edziĝi kun vidvino Emerenciana?

— Edziĝi, ne, ĉar se ŝi edziniĝus, kompatinda!, ŝi perdus la pension; mi deziras nur . . .

— Ne daŭrigu! Oni ne devas diri iajn aferojn, eĉ ŝercante!

— Mi ne ŝercas; mi parolas serioze, kiel mi jam parolis al ŝi!

— Al kiu?

— Al vidvino Emerenciana.

— Vi estas freneza!

— Ĝuste tion ŝi diris al mi.

— Ĉu vi protestis?

— Mi protestis, dirante al ŝi, ke se mi havus monon por aĉeti revolveron, mi min mortigus! — Por tio ne dubu, ŝi diris.

— Ĉu ŝi donis al vi monon?

— Ne, mi ĝin tute ne akceptus; por kiu vi prenas min? Ŝi donis al mi revolveron, kiu apartenis al ŝia edzo, kaj kiun ŝi konservis ŝargitan per ses kartoĉoj, en la fundo de ia tirkesto, Jen ĝi! . . .

Kaj Braŭlio elprenis el la poŝo la armilon kaj montris ĝin al mi — ian belegan Lefauchaux.

— Ĉu vi do volas mortigi vin per ĝi?

— Jes, mi volas mortigi min kaj mia decido estas neskuebla! Estas necese montri, ke mi almenaŭ iun tagon havis saĝon!

— Estu sincera! Kiu tion diras, tiu ĝin ne faras.

— Ni vidu . . . Ni vidu, ne; vi vidos, ĉar mi, post morto, feliĉe nenion plu povos vidi.

— Konsentite, sed mi petas vin, ke vi ne mortigu vin ĉi tie, en mia hejmo.

— Trankviliĝu, mi mortigos min en la tombejo mem, por fari al aliaj kiel eble plej malgrandan ĝenon.

— Bone, mi havas multe da laboro farota; mi ne povas perdi tempon per viaj azenaĵoj. Ĝis revido.

— Ĝis revido, ne. Adiaŭ!

— Adiaŭ do, sed atentu! estu singarda! rimarku, ke la revolvero estas ŝargita! . . .

Kaj mi eliris, lasante ilin solaj, la revolveron kaj lin.

Estis la sepa vespere. Mi faris tion, kion mi devis fari, kaj decidis fini la vesperon en teatro. Post la spektaklo mi estis devojigita de amiko, kiu kondukis min al Braganco por noktomanĝi. Fininte la noktomanĝon, mi

ekbruligis cigaron, adiaŭis mian kunulon kaj piede trankvile ekiris mian hejmon, kiu staris ĉe la fino de strato Riachuelo. Estis la unua post noktomezo.

Mi survoje memoris Braŭlion, kaj la fakto, ke mi forlasis lin kun revolvero en la mano, fakto, al kiu mi donis nenian gravecon, nun komencis impresi min, kaj eble kontribuis por tio la silento de la nokto kaj la soleco de la stratoj.

Laŭmezure kiel mi alproksimiĝis al la hejmo, mia spirito iom post iom pleniĝis per zorgoj kaj timoj; mi sentis min profunde pentinta, ke mi ne eltiris el la manoj de la kompatinda junulo tiel danĝeran armilon, kaj mi havis preskaŭajn konscienciproĉojn pro mia senprudenteco.

Prezentu al vi mian ektimon, kiam mi vidis de malproksime la domon lumigita!

Mi plirapidigis miajn paŝojn kaj distingis figuron ĉe la fenestro. Mi alkuris. Tio estis vidvino Emerenciana, kiu, apenaŭ rekonante min, kriis tie supre:
— Supreniru rapide! Vi ne scias, kiel mi estas afliktita! Se vi scius, kia malfeliĉo! Braŭlio,...

Mi aŭdis nenion plu; mi transsaltis po kvar la ŝtupojn kaj enkuris en la ĉambron de Braŭlio.

La legantoj trankviliĝu: mi ne pentros al vi sangan scenon.

La okazaĵo estis simple ĉi tiu:

Braŭlio, tuj kiam mi eliris, ankaŭ eliris kaj li iris, ne al tombejo, sed al ia granda festeno, de kiu li revenis ebria, kia patro Noa.

Mi ankoraŭ ne scias, kiel li trovis la vojon al la hejmo; kio ne estas dubebla, tio estas, ke li eniris kaj tuj sin direktis al la ĉambro de vidvino Emerenciana, kiu dormis la ĉastan dormon de la honestaj vidvinoj, eble sonĝante pri sia mortinto.

Braŭlio prenis, brakumis, kisis ŝin, kaj faris al ŝi la plej varmajn kaj neatenditajn am-deklarojn, ekkriante:

— Emerenciana! mia amatino, mia vivo! mia ĉio! mi ne povas vivi sen vi!...

La kompatinda vidvino, kiu hejme estis sola, sukcesis, preskaŭ mortinta de ektimo, liberigi sin el tiuj brakumoj kaj eliri el la ĉambro, lasante Braŭlion fermita per ŝlosilo.

Ŝi envolvis sin en la tukon, kiu kovris la manĝotablon, eklumigis la lampojn, kaj ŝi iris al la fenestro en la espero, ke la nokta patrolo aperu. Aperis mi, feliĉe.

Mi malfermis la pordon de la ĉambro de la vidvino kaj renkontis Braŭlion sternita sur la planko, ne en ia maro da sango, sed en ia lago da vomita vino.

— Sed per kiu mono li festenis? — demandus la scivola leganto.

— Per la produkto de la revolvero Lefaucheux de vidvino Emerenciana, vendita por malgranda prezo al brokantisto ĉe la strato Carioca.

Trad. Allan K. Afonso Costa



KONGRESOJ

* De 27—VII ĝis 2—VIII de la pasinta jaro, en Kopenhago, okazis la 60—a Universala Kongreso de Esperanto. Aliĝis pli ol 1.200 esperantistoj.

* De 20—a ĝis la 26—a de Julio 1975, en Hillerød, Danujo, okazis la 43—a Kongreso de Blindaj Esperantistoj.

* De la 10—a ĝis la 16—a de Aŭgusto pasintjare, en Saarbrücken, Germanujo, okazis la 1—a Internacia Konferenco de la Naŭtrala Esperanto—Movado.

* Tricent esperantistoj el 19 landoj partoprenis en la 48—a Kongreso de S.A.T., okazinta en Julio 1975, en Hago, Nederlando.

Leĝo kaj Dekreto pri Esperanto Tago de Esperanto

La Urbkonsilantaro de Caçapava, Estado São Paulo, aprobis kaj la urbestro S-ro Edmir Viana de Moura, sankciis la Leĝon n-ro 1664, de 1^a 3-a de Decembro 1975, kiu starigis la "Tagon de la Internacia Lingvo Esperanto" festotan ĉiujare en la 15-a de Decembro, naskiĝdato de Zamenhof.

Jen la teksto de la leĝo en la portugala lingvo:

Lei n.º 1664, de 3 de dezembro de 1975. Institui o "Dia da Língua Internacional Esperanto".

Edmir Viana de Moura, Prefeito Municipal de Caçapava, Estado de São Paulo, no uso de suas atribuições legais,

Faço saber que a Câmara Municipal aprovou e eu sanciono e promulgo a seguinte

Lei n.º 1664

Art. 1.º — Fica instituído, neste Município, o "Dia da Língua Internacional Esperanto", a ser comemorado, anualmente, em 15 de dezembro, data do aniversário natalício do médico e lingüista polonês Lázaro Luiz Zamenhof, criador desse idioma.

Art. 2.º — Esta lei entrará em vigor na data de sua publicação, revogadas as disposições em contrário.

Prefeitura Municipal de Caçapava, 3 de dezembro de 1975.

O Prefeito Municipal Edmir Viana de Moura.

Strato LázaroLuiz Zamenhof

La Dekreto n-ro 2.352 de la 15-a de Decembro 1975 de la Urbestro de Caçapava, SP, S-ro Edmir Viana de Moura, donis la

nomon Lázaro Luiz Zamenhof al strato en la kvartalo Jardim São José.

Jen la teksto de la dekreto en la nacia lingvo:

Decreto n.º 2.352, de
15 de dezembro de 1975

Edmir Viana de Moura, Prefeito Municipal de Caçapava, Estado de São Paulo, no uso de suas atribuições legais,

Considerando-se hoje o "Dia da Língua Internacional Esperanto", instituído neste município pela Lei n.º 1.664, de 3-XII-75, e no intuito de homenagear o criador desse idioma, o médico e lingüista polonês Lázaro Luiz Zamenhof, cujos dados biográficos ficam fazendo parte integrante deste,

Decreta,

Art. 1.º — Passa a denominar-se Rua Lázaro Luiz Zamenhof, atual Rua E do Jardim São José.

Parágrafo único. A placa denominativa conterá os seguintes dizeres: "Rua Lázaro Luiz Zamenhof — O Iniciador do Esperanto.

Art. 2.º — As despesas com a execução do presente decreto correrão à conta de verba orçamentária vigente.

Art. 3.º — Este decreto entrará em vigor na data de sua publicação, revogadas as disposições em contrário.

Prefeitura Municipal de Caçapava, 15 de dezembro de 1975.

Edmir Viana de Moura, Prefeito Municipal.

Lázaro Luiz Zamenhof O Iniciador do Esperanto

Além de médico, humanista, poliglota e poeta, Zamenhof, considerado uma das inteligências mais lúcidas de sua época, foi também criador e iniciador do idioma auxiliar internacional que mais tarde recebeu o nome de Esperanto, isto porque, foi sob esse pseudônimo, que ele, em 1887, assinou o Primeiro Manual da Língua Internacional.

Dados Biográficos

L. L. Zamenhof nasceu à 15 de dezembro de 1859, na ex-cidade rumena de Bialistok, na ocasião anexada à Polônia e sob o domínio russo. Na referida cidade, seus habitantes falavam alemão, o ruteno, o polônes, o russo e ainda o hebreu e diversos dialetos. Crescendo em meio a essa babel linguística, Zamenhof logo cedo começou a interessar-se pelo estudo de línguas, vindo a dominar com facilidade o russo, o francês, o latim, o grego, o alemão, o inglês e o idichi. Notou ele que a maior parte das disputas havidas frequentemente entre os habitantes de Bialistok eram resultantes da impossibilidade das pessoas se compreenderem reciprocamente. Daí, quando ainda frequentava o ginásio, lhe vir a idéia de criar uma língua elaborada que servisse de meio de comunicação internacional, pondo-se logo a trabalhar nesse sentido.

À 5 de dezembro de 1878, estando ele freqüentando a última série ginásial, festejou em casa de seus pais, com uns 12 ou 13 amigos, o lançamento de uma nova língua, a qual ele denominou de "língua universal", que seria a matriz do atual Esperanto.

O pai de Luiz, o professor Marcos Zamenhof, porém, não via com bons olhos essa dedicação do filho a uma causa aparentemente desligada das conveniências de um jovem. Assim, tomou-lhe o manuscrito e o fez

prometer que não se ocuparia com a língua universal, pelo menos até que se formasse em medicina. Obediente, Luiz atendeu ao pedido do pai e seguiu para Moscou, onde iniciou o curso de medicina que veria terminar em Varsóvia. Quando quis reaver os manuscritos, soube pela genitora que o pai os havia rasgado e queimado. Sem desanimar, refez todo o trabalho, aproveitando o que lhe figurava funcional e eliminando o que a sua maior experiência lhe indicava como viável.

Por esse tempo, o novel Dr. Lázaro Luiz Zamenhof fez um curso de oftalmologia em Viena, contratara casamento com Clara Zilbernik e recebera de seu sogro, como presente de núpcias, o financiamento da edição do "Primeiro Manual da Língua Auxiliar Internacional". Era 14 de julho de 1887.

Aquela primeira brochura, impregnada do idealismo de um jovem médico recém-formado, foi a semente inicial de um grande movimento humanista e linguístico que em breve haveria de conquistar adeptos na Alemanha, na Inglaterra, na França, na Itália, no Japão, na China, no Brasil, e finalmente em todo o mundo. Já em 1905, Zamenhof ao passar por Paris a caminho de Boulogne-sur-Mer onde ia participar do I Congresso Universal de Esperanto, recebeu das mãos do Ministro da Educação da França, a mais alta honraria francesa — A Cruz da Legião de Honra.

O primeiro clube de Esperanto foi fundado em Nürnberg (Alemanha) em 1890, por Leopoldo Einstein. Coube ao Brasil o privilégio de ter sido o primeiro país a declarar o Esperanto "língua clara" para o uso nos Correios e Telégrafos, por decisão do então Ministro da Viação Dr. Lauro Müller, em atenção à solicitação do deputado Medeiros e Albuquerque que se deixara influenciar pelo grande esperantista que foi o escritor Arthur Azevedo.

Por ironia da sorte, Zamenhof, o apóstolo da confraternização universal, veio a falecer à 14 de abril de 1917, ouvindo o estourar das bombas da Primeira Guerra Mundial.

A sua vida inteira foi consagrada ao nobre ideal de aproximar os homens por meio de uma linguagem comum, e de fazê-los conviver em harmonia, e mesmo com amizade, sem preconceitos de cor, raça, religião, nacionalidade ou regime político. A sua mensagem, a cada dia que passa, torna-se mais atual, por existirem ainda outros seres que acreditam na estupidez das guerras e na irracionalidade dos preconceitos.

O ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

Alemanha — Em Paderbon, onde o Esperanto é ensinado na universidade e onde cerca de 250 crianças estão empenhadas no seu aprendizado, foi inaugurado um restaurante para esperantistas. Tanto o dono como sua mulher, e até a *garçonette*, falam a língua internacional. O restaurante, que tem o nome de "Bareleto", fica na Kasseler Str. 1, D-479 Paderborn.

Estados Unidos — No último congresso da M.L.A. (Modern Language Association), reunido em Nova Iorque, organizou-se um seminário sobre o "O Idioma Esperanto e sua Literatura" e "Interlingüística". Tem-se como certo que esta contribuição se deve aos cursos de verão realizados pela Universidade Estadual de São Francisco.

Japão — Instalou-se em Tóquio um serviço de informações por telefone (Telefona-Servo). Discando o número 371-5644, qualquer pessoa poderá ouvir, no período de 9 horas da noite às 9 horas da manhã, notícias do movimento esperantista.

Suiça — Em julho do ano passado, o Cen-

tro Esperantista Cultural de La Chaux-de-Fonds organizou um curso de tradução em Esperanto, dirigido por Claude Piron, tradutor da Organização Mundial da Saúde para o francês das línguas inglesas, espanhola, russa, chinesa e Esperanto. Os candidatos deviam conhecer, além do Esperanto, o francês ou o inglês.

O ESPERANTO NA IMPRENSA DO BRASIL

Publicaram notas ou informações em ou sobre o Esperanto os seguintes periódicos:

O Valenciano, Valença, RJ, 27-7-75. Soneto do jornalista José Pinheiro Fernandes, dedicado ao Esperanto.

Diário de Notícias, Porto Alegre, RS, 24-9-75, 26-10-75. Contribuição de E. Breitenbach.

Correio do Povo, Porto Alegre, RS, 24-8-75. Artigo de M. Belmonte de Abreu.

Folha de Subúrbio, Camaçari, BA, ag. e set. 1975.

O Taubateano, Taubaté, SP, 15 a 22-9-75.

Diário de Caçapava, Caçapava, SP, 13-11, 5-12-75.

Matutino Popular, Caçapava, SP, 11-11; 9-12-75, com transcrição da Lei Municipal, que institui o "Dia da Língua Internacional Esperanto".

A Tribuna, Taubaté, SP, 12-3, 25-10, 2-12, 12-12, 16-12-75. Artigos G. A. Silva Velho.

Tribuna de Lavras, Lavras, MG, 2-11-75.

O Médium, órgão da Aliança Municipal Espírita de Juiz de Fora, MG, nov. 1975, transcrito do "Brazila Esperantisto".

Sei, Serviço Espírita de Informações, Rio de Janeiro, RJ, 6-12-75.

Despertador, órgão da Associação Espírita Despertador, São Paulo, out. e dez. 1975.

Correio Fraterno, do ABC, órgão do Lar da Criança Emmanuel, São Bernardo do Campo, SP, nov. 1975.

A Candeia, órgão da Frente de Renascimento Espiritual Lucis, Brasília, n.ºs 77 e 78, de 1975.

Vortoj de Papo Paŭlo VI al la Esperantistoj

Dum la ĝenerala aŭdienco, okazinta sur la Placo Sankta Petro, la 13-an de Aŭgusto 1975, Papo Paŭlo VI tute aparte sin turnis, en itala lingvo, al la partoprenantoj de la Internacia Kongreso de I.K.U.E.:

—Nun Ni adresas nian saluton kaj nian bondeziron al la partoprenantoj de la 36-a Internacia Kongreso de la Katolikaj Esperantistoj. Al viaj specialaj kulturaj celoj, vi povas aldoni elektegan religian noton, eniĝante en la spiriton de la Jubileo, kiu invitas ĉiun bonvolan homon renoviĝi, trovi la kontakton kun Dio, kiu amas kaj pardonas. Ĉi tiu spirito gvidu vin en la instigo al frateco kaj kompreniĝo inter la diversaj popoloj malsamlingvaj, laŭ la programo, kiu vin distingas. Tio estas nia sincera deziresprimo, kiun Ni plivalorigas per nia Apostola Beno, favorante la donacojn de la Sinjoro."

NEKROLOGO

Acácio Matos Cavalcante

Kun granda bedaŭro ni informas la morton de S-ro Acácio Matos Cavalcante okazin-

tan en Rio de Janeiro la 4-an de Oktobro de la pasinta jaro. Li naskiĝis en Belém, PA, kaj estis oficisto de registara kompanio de navigacio.

S-ro A. M. Cavalcante havis niajn Elementan kaj Superan Diplomojn. Longan tempon li helpis en la sekretariaj servoj kaj en la kunvenoj de Brazila Klubo "Esperanto" li montris siajn kompetentecon kaj afablecon per prezento de kuriozaj vortludoj kaj kaprompiloj.

Sinceran kondolencon al la familio de la karmemora samideano.

Hans Steiner

La 9-an de Oktobro 1975 forpasis S-ro Hans Steiner, prezidanto de Aŭstria Esperanto-Movado.

S-ro Stein lernis Esperanton en 1934 kaj ĝis la morto li senĉese laboris por Esperanto.

Latinamerika Kroniko

Kolombio

Medellín — En la pasinta jaro, Antiokia Esperanto-Ligo ekpublikigis sian oficialan organon "Avangardo".

En la 2-a numero, "Avangardo" informas pri la Unua Kolombia Kongreso de Esperanto okazonta en Decembro de la kuranta jaro.

* * *

DEPOIMENTO

Lord Roberto Cecil, Membro do Parlamento Britânico: "Sou favorável ao Esperanto e considero que a língua mundial não é somente necessária aos intelectuais, mas antes de tudo aos povos mesmos. É um grande êxito para o Esperanto o relatório muito documentado, aceito pela Comissão da Liga das Nações. Aconselho aos esperantistas que continuem corajosamente o seu nobre trabalho."

DIPLOMOJ

1975

Faris ekzamenon kaj ricevis diplomon jenaj esperantistoj:

NORMA ELEMENTA DIPLOMO

Brazilia Esperanto-Ligo:

José Braz de Araújo

Antonio Eduardo Lage

Campos Esperanto-Klubo, Campos, RJ:

Kátia de Paula

Maria Angélica Alves Gomes

Sílvia Beatriz Alves Gomes

Per korespondado:

Maria Júlia Junqueira Rodrigues da Cunha,
Uberaba, MG

Newton Ramos de Oliveira, São Carlos, SP

Paulo Domingos Mieres Caruso, Pelotas, RS

Joaquim Augusto de A. R. de Oliveira, Juiz
de Fora, MG

Jailto Gomes dos Santos, Arapiraca, AL

Balduino Egon Breitenbach, Porto Alegre,
RS

NORMA SUPERA DIPLOMO

Per korespondado:

Danilo Lemos Martins, Bagé, RS

Stratoj kaj Placoj ESPERANTO kaj ZAMENHOF

En la numero Aprilo-Junio 1962, "Brazilia Esperantisto" prezentis liston de stratoj kaj placoj kun la nomo Esperanto kaj Zamenhof.

Jen la nuna kompleta listo:

1913: Rua Esperanto, Rio de Janeiro,
Rio de Janeiro.

1917: Rua Zamenhof, Rio de Janeiro,
Rio de Janeiro.

1932: Rua Esperanto, Aracaju, Sergipe.

1937: Rua Esperanto, Salvador, Bahia.

1937: Rua Zamenhof, Porto Alegre, Rio
Grande do Sul.

1945: Rua Esperanto, Pedro Velho, Rio
Grande do Norte.

1947: Rua Esperanto, Belo Horizonte,
Minas Gerais.

1949: Avenida Esperanto, João Pessoa,
Paraíba.

1951: Rua Esperanto, Recife, Pernambuco.

1952: Praça Esperanto, Coração de Jesus,
Minas Gerais.

1952: Rua Esperanto, Ubá, Minas Gerais.

1953: Rua Zamenhof, Curitiba, Paraná.

1953: Rua Esperanto, Porto Alegre, Rio
Grande do Sul.

1953: Rua Dr. Lázaro Zamenhof, Juiz
de Fora, Minas Gerais.

1957: Rua Dr. Zamenhof, Macaé, Rio
de Janeiro.

1957: Rua Esperanto, Macaíba, Rio Grande
do Norte.

1957: Rua Esperanto, Niterói, Rio de
Janeiro.

1957: Rua Zamenhof, Maceió, Alagoas.

1959: Rua Esperanto, Nilópolis, Rio de Ja-

neiro.

- 1959: Rua Esperanto, **Soledade**, Rio Grande do Sul.
- 1959: Rua Esperanto, **Sorocaba**, São Paulo.
- 1959: Rua Esperanto, **Santo Amaro**, Bahia.
- 1959: Rua Esperanto, **Campinas**, São Paulo.
- 1959: Rua Lázaro Ludoviko Zamenhof, **Feira de Santana**, Bahia.
- 1959: Praça Dr. Zamenhof, **Natal**, Rio Grande do Norte.
- 1959: Praça Esperanto, **Natal**, Rio Grande do Norte.
- 1959: Rua Dr. Zamenhof, **São João da Boa Vista**, São Paulo.
- 1959: Rua Dr. Zamenhof, **Santa Maria**, Rio Grande do Sul.
- 1959: Travessa Esperanto, **Macau**, Rio Grande do Norte.
- 1960: Praça Esperanto, **Monte Santo**, Minas Gerais.
- 1961: Praça Esperanto, **Resende**, Rio de Janeiro.
- 1961: Avenida Esperanto, **Uberlândia**, Minas Gerais.
- 1963: Rua Esperanto, **Pompéu**, Minas Gerais.
- 1963: Avenida Esperanto, **Açu**, Rio Grande do Norte.
- 1963: Rua Esperanto, **Cruzeta**, Rio Grande do Norte.
- 1965: Rua Esperanto, **Joinville**, Santa Catarina.
- 1965: Rua Esperanto, **Santos Dumont**, Minas Gerais.
- 1967: Rua Idioma Esperanto, **São Miguel Paulista**, São Paulo.
- 1968: Rua Dr. L. L. Zamenhof, **Rio Grande**, Rio Grande do Sul.
- 1968: Rua Dr. Lázaro Ludoviko Zamenhof, **Rio Grande**, Rio Grande do Sul.
- 1969: Praça Esperanto, **Rio Grande**, Rio Grande do Sul.
- 1970: Rua Esperanto, **Juiz de Fora**, Minas

Gerais.

- 1970: Rua Dr. Luís Lázaro Zamenhof, **São Carlos**, São Paulo.
- 1970: Rua Dr. Luís Lázaro, **São Lourenço**, Minas Gerais.
- 1971: Rua Esperanto, **Belém**, Pará.
- 1971: Praça Esperanto, **Campos**, Rio de Janeiro.
- 1975: Rua Lázaro Luiz Zamenhof, **Caçapava**, São Paulo.

La supra listo montras 37 stratojn, 4 avenuojn kaj 7 placojn, entute 48, el kiuj 34 kun la nomo Esperanto kaj 14 kun la nomo Zamenhof:

stratoj: Esperanto	—	23
Zamenhof	—	14
avenuoj: Esperanto	—	4
placoj: Esperanto	—	6
Zamenhof	—	1

48

La malsupra statistiko montras, ke el 13 Stato Minas Gerais okupas la unuan lokon laŭnombre:

1. Minas Gerais	11
2. Rio de Janeiro	7
3. Rio Grande do Sul	7
4. Rio Grande do Norte	7
5. São Paulo	6
6. Bahia	3
7. Sergipe	1
8. Paraíba	1
9. Pernambuco	1
10. Paraná	1
11. Alagoas	1
12. Santa Catarina	1
13. Pará	1

48

Teknikaj Resumoj

1. Petrolindustrio

Esplorado kaj Produktado de la Petrolo

La esplorado de petrolo kaj ĝia produktado estas la plej malfacilaj fazoj de tiu industrio, ne nur el vidpunkto teknika sed ankaŭ pro la altaj kostoj kiujn oni devas fronti. Por trovi strukturon favoran al la kolektiĝo de oleo kaj gaso, estas uzataj metodoj de Geologio kaj Geofiziko — metodoj kies amplekso kaj karaktero varias laŭ la tipo de la esplorata regiono. Menciindaj estas: Aerofotogrametrio, nome la studo de la regiono por stereoskopia ekzameno de fotoj prenitaj el aeroplano; Paleontologio — la studo de fosilioj kaj de ilia rilatigo al strukturoj favoraj al la formiĝo kaj amasiĝo de la oleo; Geologia Analizo de rokaj specimenoj trovitaj sur la tersupraĵo mem aŭ kolektitaj el la interno de la grundo por traborado de eksperimentaj — stratigrafiaj — truoj; Geomikrobiologio — studanta la influon de la mikroorganismoj sur la transformiĝon de la organa materio; Geokemio, kiu serĉas rilatojn inter kolektitaj specimenoj de akvo, gaso kaj oleo, kaj la ĉesto de petrolhavaj strukturoj. La Geofiziko utiligas tri ĉefajn metodojn: gravimetrian, sisman kaj magnetan. Ĉe la unua oni mezuras la ŝanĝiĝojn de la altirforto de la tero kaŭzita de la malsameco de subteraj rokoj; la sisma metodo estigas eksplodojn je kelkaj profundeco kaj studas la resenditajn ondojn per sismografo. La metodo magnetia siavive baziĝas sur la fakto, ke la magnetika kampo de la tero varias laŭ la karaktero kaj pozicio de la rokoj.

Kiam la utiligo de tiuj rimedoj de esplorado permesas kolekti elementojn sufiĉajn por la karakterizo de favora regiono, oni tiam decidas bori pioniran truon. La ekipaĵo

uzata por la traborado resume konsistas el: Petrolturo — tursimila strukturo servanta kiel apogilo por tenado de la serio de stangoj kaj tuboj, fine ligitaj al la borilo, en la fundo de la ŝakto; "Turniĝanta Tablo" — movata de potencaj motoroj, sur kies centro estas kvadrata aŭ heksagona truo, al kiu oni kroĉas stangon de poligona sekcio. Al tiu ĉi lasta estas fiksitaj cilindraj stangoj, aŭ tuboj, ĉe kies ekstremaĵo situas la borilo mem. Turniĝante, la "tablo" movas la stangojn, tubojn kaj borilon. La borilo agas per frotaĵo de siaj konusformaj pintoj el ŝtalo kontraŭ la roko. Tra la centra parto de la tuboj oni injektas specon de koto, kun la celo malvarmigi la borilon, kuntreni la fragmentojn de roko kaj ilin forigi, ĉe la supro de la ŝakto, kaj fine formi fluidan kolonon kies pezo kontraŭstaras la premon de la gasoj amasigitaj en la fundo. Kiam la borado progresas, la poligona stango malleviĝas ĝis la nivelo de la tavolo; oni tiam dekroĉas la stangon de la plej supra tubo, aldonas novan tubon, kaj tiel plu.

Se la truo atingas petroltenejon, oni haltigas la boradon kaj instalas sistemon el valvoj — nomitan "Kristnaskoarbo" — sur la supro de la tubaro. Ties celo estas kontroli la eliron de la oleo kaj de la gasoj sen danĝero de eksplodo aŭ forbloviĝo.

La petrolo, per sia propra natura premo, aŭ per helpo de specialaj pumpiloj, fluas en grandajn vazojn kaj, post apartigo de sala akvo, estas transportata en rafinejojn. La rafinado ni pritraktos en la lasta artikolo de ĉi tiu serio.

ESPERANTISTOJ MORTIGAS ESPERANTON

Mag. Isaj Dratwer

La plej famaj lingvistoj, filologoj, ankaŭ, korifeoj de la tutmonda literaturo substre-
kis la admirindan konstruon de Esperanto,
ĝian flekseblecon, logikecon kaj esprimri-
ĉecon. Tamen esperantaj verkistoj, poetoj,
literaturistoj faras ĉion eblan por renversi
kaj detrui tiujn favorajn opiniojn pri la
lingvo internacia genie kreita de Zamenhof.

La sufiksoj kaj prefiksoj, tiel laŭdataj, fa-
riĝas nenecesaj! Oni ĉesis kompreni la esen-
can diferencon inter "komencas" kaj "ko-
menciĝas", "finas" kaj "finiĝas". Oni eĉ
skribas "kasanta" (?) anstataŭ korekta "en-
kasiganta la kotizojn"! Oni forlasas sufikson
"in" kaj ofte estas malfacile diveni, ĉu temas
pri viro aŭ virino.

Oni enkondukas en la internacian lingvon
nenecesajn neologismojn precipe angledeve-
najn. Recenzisto de iu verketo, dezirante ri-
dindigi la prefikson "mal" per speciale fabri-
kita frazo, skribas sagace, reve, sopireme:
"ĉu ne impresas pli riĉe (?!), pli vivece (?!),
pli nature (?!): "la turba oldulino softe aper-
tis la pordon al sia kelo kaj lente descendis la
ŝtuparon". Verŝajne pro forgeso li ne metis
"eskalon", tiam la frazo estus eĉ pli natura,
pli viveca!

Anstataŭ esperantaj "okcidento", "orien-
to", "klarigi", "dekduo" oni uzas "ŭesta",
"eosta" (teruraĵoj!), "eksplici" (kun kvar
sinsekvaj konsonantoj!), "dozeno" ktp,
ktp.

Dum lernejoj jaroj ĉiu estis instruata re-
pekti gramatikon de sia propra lingvo kaj ko-
rekte ĝin uzi. Tamen multaj verkemaj kaj
skribemaj esperantistoj opinias, ke la grama-
tikon kaj la stilon de la internacia lingvo oni
rajtas malatenti kaj neglekti. Multaj faktoj
pruvas, kiel esperantistoj mem kripligas kaj

senvalorigas Esperanton. Ĝi estas lingvo vi-
vanta kaj kompreneble devas ensorbi novajn
nociojn, terminojn k.s. Se Zamenhof revivi-
ĝus, li certe ne komprenus multajn espri-
mojn, kiel ekzemple, nukleo, atoma armilo,
televido, vitamino, faŝismo ktp. Feliĉe li an-
kaŭ ne konis la nocion "hitlerismo": tiam
verŝajne li havus la saman sorton kiel liaj
gefiloj kaj milionoj da liaj samgentanoj! . .

Esperanto ne povas esti lingvo de unuopaj
poliglotoj, sed ĝi estas jam la lingvo de pluraj
miloj da homoj, uzantaj ĝin praktike, buŝe
kaj skribe. La esperantistoj fine devas kom-
preni, ke la lingvo internacia ne povas esti
konglomerato de vortoj, hazarde prenitaj el
nacilingvaj vortaroj, sed estas vivanta lingvo,
havanta siajn fiksojn, nepre respektindajn
regulojn, la lingvo nature evoluigonta. Espe-
rantistoj ne mortigu Esperanton!

(El Heroldo de Esperanto, n-ro 1572, Feb. 1975)

RICEVITAJ PERIODAĴOJ

En 1975, ni regule ricevis jenajn Esperantajn
periodaĵojn:

Aŭstria Esperanto-Revuo, Avangardo,
Boletin, La Brita Esperantisto,
Esperanto, Esperanto-Aldono, Espero Kato-
lika, La Espero, Esperanto Aktuell, Esperan-
to-Gazeto,
Franca Katolika Esperantisto,
Informilo (I.E.M.W.),
Heroldo de Esperanto,
La Juna Penso,
Nov-Zelanda Esperantisto, Norvega Esperan-
tisto, Newsletter,
La Revuo Orienta, Revista Portuguesa de Es-
peranto,
Starto, Sennaciulo, Sat-Amikaro, Svisa Es-
peranto-Revuo,
Universala Ligo,
Valencia Lumo, Venezuela Stelo.

BARBEAR — 1. *Razi* sin, klienton; *razi* al iu la barbon; *razi* sin par *razilo*, *razklingo*, *razaparato*; *elektrozuzo*; *elektrozuzi* sin. 2. *Razigi* al si la barbon en barbirejo.

BARBEIRAGEM — Fari mallertajon, *fuŝaĵon*.

BARBEIRO — 1. *Barbiero* (razas barbon kaj tondas harojn); *razisto*; en *barbirejo*; en *razejo*. 2. *Fuŝoŝoro*; *fuŝveturigisto*.

BARBELA — *Mentonĉeneto* de ĉevalo; kroci la ŝaŭmĉenon al ĉevalo.

BARBICHA — Surhavi barbeton, *kuprobarbon*.

BARBIRRUIVO — *Ruĝbarbulo*.

BARBITÚRICO — 1. Preni *kvietigilon* por dormi; *dormigilo*, *endormigilo*. 2. *Barbitura*, dietilbarbitura acido.

BARBUDO — 1. *Longbarba viro*; *barbulo*. 2. *Barbio* (Zoo. "barbus"); *barbfiŝo*.

BARCA — 1. *Barko* (senferdeka ŝipeto). 2. *Pramo* por transiri riveron. 3. *Pramŝipo*; *radŝipo* de Amazono.

BARÇA — *Bargó* (ŝargoboato kun plata fundo, uzata sur riveroj).

BARCAROLA — Kanti *barkarolon*.

BARCO — 1. *Ŝipo* (ĉia navebla akvoveturilo); *ŝipeto*; *barko* (inter granda de ŝipo kaj boato). 2. *Kvarmasta barko* (velŝipo). 3. Fari *surboatan promenadon*.

BARDANA — *Lapo* (Bot. "lappa").

BARDO — Mezepoka *bardo* (poetokantisto).

BARE — 1. *Baro* (premunuo, 1,0197 kg en cm²). 2. *Barjo* (premunuo egala al 0,001 baro).

BARGUILHA — *Fendo* de pantalone; "kacujo".

BÁRIO — *Bario* (metalo).

BARITA — *Barito* (oksido de bario).

BARITONO — Kantas *baritono*; kun *baritona voĉo*.

BARLAVENTO — 1. La *lofo* (flanko de ŝipo almetata al vento); *lofa flanko*; *alventa flanko*; la ŝipo estas *alvente* de la insulo.

BARNABITA — *Barnabano* (kongregaciano).

BAROCO — Imiti la *barokon* (Ark.); la *baroka stilo*.

BARÓGRAFO — Mezuri per *barografo*.

BARÓMETRO — Mezuri per *barometro*.

BARONATO — 1. Atingi la *baronecon*. 2. La *baronlando*; *baronejo*.

BARONETE — *Baroneto* (nobelo).

BAROSCÓPIO — Indikita de *baroskopo*.

BARQUEIRO — 1. *Boatisto*; *boatano*; la *transpasigisto*. 2. *Haŭlistoj* ĉe Volga.

BARQUILHA — Mezuri rapidon de ŝipo per *logo*; navigi laŭ la *logo*.

BARRA — 1. Fera *stango*; *ferbarilo* de fenestro; *kradofenestro*; *rudrostango*. 2. *Gimnastiki per reko* (unustanga). 3. *Sapobriko*; *kruda gismo*; *gisbriko* (rafinita). 4. *Enira ŝanelo* de haveno; *antaŭhaveno*; *mara, havena pasejo*; *enirejo* de golfeto. 5. *Alkroci* sin al la *rando* de patrino jupo. 6. *Gramatika haltostreko*; *muzika taktostreko*; *teksaĵo* kun bluaĵ *strioj*.

BARRACA — 1. *Starigi*, *malstarigi*, kunmeti la *tendon*; *tendostango*; *tendotolo*; *tendotuko*; *tendongloj*. 2. *Vendobudo* de bazaro; *budo* de legomvendistino.

BARRACÃO — 1. *Loĝi* en *barako* (provizora konstruaĵo). 2. *Tabulbudo*.

BARRAGEM — 1. *Konstrui barajon* en rivero; *akvobaraĵo*. 2. *Barpafado*.

BARRANCA — *Krutbordo* de S. Francisco; *riverborda krutaĵo*.

BARRANCO — 1. *Krutbordo* de S. Francisco; *riverborda krutaĵo*. 2. *Taluso* de fosajo.

BARRAR — 1. *Bari* la vojon, *enirejon* al iu; *bari* la fluon de la rivero, *trafikon*. 2. *Bari* la progreson.

BARREIRA — 1. *Survoja bariero*, *bartrabo*, *barilo*; *dogana bariero*. 2. *Ĉevalkuro* kun *hurdoj*, *saltobartloj*; la *hurdokurado*. 3. La *barado* de la Andoj; *baro* kontraŭ ĉia evoluo; *lingva baro*; *baro* kontraŭ krimo. 4. *Terfalo*; *terŝoviĝo*, *terglito* sur ŝoseo. 5. *Venki la sonmuron*.

BARRELA — *Boligi* *tolajon* en *lesivo*.

BARRENTO — *Kota ŝoseo*.

BARRETA — Surhavi *medalrubandeton*.

BARRETE — *Vertoĉapo*; *bireto* de pastro, *juĝisto*; la frigia *ĉapo*.

BARRICA — *Daŭboj* de *barelo*.

BARRICADA — *Starigi enurbajn barikadojn*.

BARRICAR — *Barikadi* *sian pordon*.

BARRIGA — 1. Kun sata *ventro*; kun okuloj pli grandaj ol la *ventro*; senti *ventrodoloron*, *ventran doloron*; kuŝi sur la *ventro*; 2. *Ĵetigi vizagaltere*. 3. *Suro*, *tibikarno* (de la kruro).

BARRIGA-D'ÁGUA — *Hidropso* (peritona); *likvamaso*.

BARRIGUDO — Fariĝi *dikventra*; la *dikventrulo*, *ventraĉulo*.

BARRIGUEIRA — Streĉi la *selzonon*, *ĉevalzonon*; *zonego de ĉevalo*.

BARRIL — *Barelo* da vino; *barelo* de, por vino.

BARRILETE — *Bareleto* da pulvo.

BARRO — 1. Poto el *argilo*. 2. Makuli sin per *koto*.

BARROTE — *Solivoj* de planko, ferdeko. **BARTEDOIRO** — *Ŝkopo* (por forcerpi akvon el boatfundo); *ĉerpilo*.

BARULHENTO — *Brua* festo; *bruema* knabo; *bruplena* loko, hotelo.

BARULHO — 1. *Bruo* de rompo, falo; *fari bruon*; *kian bruadon vi faras!* *bruado* de amboso; *metala, kristala bruo*; la vento *bruas* tra la arboj. 2. Multe da *bruo* pri, por, pro nenio; *brui* pri bagatelo. 3. Aŭskului *bruon* en la pulmo.

BASALTO — *Basalto* (Min.).

BASBAQUE — *Mirigi gapulon*; la *gapanto*.

BÁSCULA — *Vekta pesilo*.

BASCULANTE — *Baskulponto*; *baskul-fenestro*; *baskulŝaltilo*; *ŝutkamiono*.

BASCULAR — La fenestro *baskulas* (sur horizontala akso).

BASE — 1. *Bazo* de monto; *bazo* de plantparto; *bazo* de triangulo; *bazo* de konstruaĵo. 2. *Subkonstruaĵo* de monumento; *soklo* de elektrontubo; *tubingo*; *piedbazo* de stativo; *trakbazo* de fervojo. 3. *Bazo* de teorio, premiso, pretendo; *fundamente* malprava. 4. Ĉe a^a la litero a estas la *potencato*. 5. *Fonfarbo*, *jonŝminko*, *ŝminkobazo*; *ŝminkoblanko*; *poroplenigilo*. 6. *Kemia bazo*. 7. *Milita bazo*; *marbazo*; *starigi bazon* de operacioj. 8. La *teksbazo*.

BASEADO — Principo *baziĝinta* sur aksiomo; *surbaze* de tiu principo.

BASEAR — *Bazi* sian teorion sur aksiomo; *bazi* sin sur informo; la metodo *baziĝas* sur la praktiko.

BASE-BALL (i.) — Ludi *basbalon*, *bazopilkon*.

BASICIDADE — *Bazeco* de substanco.

BÁSICO — 1. La baza tavolo, masonaĵo. 2. *Baza* principo. 3. *Baza reago* de la solvaĵo.

BASILICA — *Baziliko* de Lurdo.

BASILISCO — *Bazilisko* (Mit.).

BASQUETEBOL — Ludi *korbopilkon*; la *korbopilkludo*.

BASQUETEBOLISTA — *Korbopilkisto* (Spo.).

BASSET (f.) — *Vertago* (hundeto).

BASTANTE — Uun fajrero estas *sufiĉa* por eksplodigi pulvon; havi *sufiĉe* da tempo; estas *sufiĉeco* da tempo; li estas *sufiĉe* kapabla por tio.

BASTÃO — 1. *Bastono* (apogstango, batilo, insigno); *bastono* de marŝalo; *ordonbastono*; *regbastono*. 2. *Skibastono*, *golfluda bastono*; *agiti* per vitrovergo. **BASTAR** — 1. *Sufiĉas* diri, ke...; *du sufiĉas* por mi; *tiom sufiĉas*, dankon. 2. *Sufiĉe* pri tiaj stultajoj! *Kaj sufiĉe!* *ne pluen!* kun traktatoj *kvite!*

BASTARDIA — Pro sia *bastardeco*.

BASTARDO — *Bastarda*, *eksteredzeca*, *eksteredza filo*; la *bastardo*.

BASTIÃO — 1. *Bastiono* de fortikaĵo. 2. *Bastiono* de Kristanismo.

BASTIDOR — 1. Sub premo de *kulistimo* (Tea.); *vidi* post la *kulisoj*; la *kuliso* de la politiko. 2. *Tamburino*, *brodringo*, *brodkadro*; *tamburbrodi*.

BASTO — Kun *densa* hararo.

BASTONADA — Atingita per *bastonbato*; oni *bastonis* lian kapon.

BATALHA — 1. *Gajni*, *venki*, *perdi* la *batalon* por Solferino; la *batalo* apud Tuiuti; sur la *batalkampoj*. 2. *Batalo* pri, por la vivo; *fari grandan aferon* el nenio.

BATALHADOR — 1. La grandaj *bataluloj*. 2. *Batalema* samideano; *batalemuloj* pri tiu ideo.

BATALHAR — 1. *Batali* por io, kontraŭ io. 2. *Batali* por venki malfacilaĵojn, por triumfigi sian idealon.

BATALHÃO — *Infanteria bataliono*.

BATATA — 1. *Terpomo*; *senŝeligita*, *kuiro*, *friti terpomojn*; *bakita*, *fritita*, *pufigita*, *stufita*, *fritŝveligita*, *pajle fritita*, *ŝelkuirita terpomo*; *terpoma kaĉo*. 2. *Batato* (Bot. "batata").

BATATA-DOCE — *Batato* (Bot. "batata").

BATAVO — La *batava* popolo; la *batavo* (log. *Batava Respubliko*, *Nederlando*).

BATEDEIRA — *Kuireja kirlilo*; *buterigilo*; *kirlilo* por ovoj, *kremo*; *elektra kirlilo*; *miksilo* por farunoj.

BATEDOR — 1. *Frapilo* de pordo; *lavbatilo*; *batilo* por tapiŝoj. 2. La *antaŭrajdantoj* de la karavano; la *batuistoj* (en casado), *ĉaspelantoj*. 3. *Poŝtelistoj*; *poŝaj ŝtelistoj*.

BATEDOR-DE-CARTEIRA — *Poŝtelisto*, *poŝa ŝtelisto*.

BATE-ESTAÇA — *ŝtipbatilo*; *vaporprema*, *aerprema ramo*.

BATENTE — 1. *Buteo* (limigilo) sur akso, ŝafto; *haltilo*, *haltopeco* de nadlo. 3. *Fosto* de pordo. 4. *Bufrobloko* de vagono. 5. En sia *servoloko*.

BATE-PAPO — Fari agrablan *babiladon*.

BATER — 1. *Bati* (ektuŝegi); *frapi* (bati malpli draste, sondonante, atingoplene); *frapi* iun per bastono; *frapigi* kontraŭ la pordo; *albatigi* al angulo de tablo. 2. *Bati*, *punbati* infanon. 3. *Albati*, *brufermi*, *frapfermi*, *klakfermi* la pordon. 4. *Fra*pi je ies pordo; *vokfra*pi pordon; *pordfra*pi; *sonorigi* je ies pordo; *eniru* *ne*frapinte, *nesonoriginte*; la *frapbru*o de pordo. 5. *Kunbati* la dentojn; *kunfra*pi, *interfra*pi la manojn. 6. *Fra*pi tamburon, tamtanon. 7. *Enbati* najlon en tabulon; *albati* hufferon al ĉevalo; *bati* tapiŝon; *elbati* tabakon el pipo. 8. Ŝipo *enpuŝigis* sur rifon; aŭtomobilo *koliziis*, *kunpuŝigis* kun aŭtobuso. 9. La horloĝo *batis* la duan; ĵus *sonoris* la dua; mia koro forte *batis*. 10. Birdo *svingas* la flugilojn. 11. Disbati farunon kun sukero; *kiri*li ovojn, kremon; *buterigi* kremon. 12. *Venkobati* malamikon; *superi* rekordon. 13. *Batui* (en ĉasado) la tigron; polico *rastis* la kvar-talon.

BATERIA — 1. Artileria *baterio*; la *baterio* de haŭbicoj. 2. *Baterio* de akumuloj; telefona *centrobaterio*; *baterio* de lineo. 3. *Drumo* de ĵazorkestro; la *drumisto*.

BATIDA — 1. *Kunpuŝiĝo* kontraŭ muro; ricevi *puŝfrapon* de aŭtomobilo; *kolizio*, *kunpuŝiĝo*, *kunfrapiĝo* de kamionoj. 2. *Krako*, *frapbru*o de pordo; la *batado* de la koro, *korbato*; per *frapo* de la flugilo. 3. *Kirlaĝo* el kokoso (kaj brando). 4. *Batuo* (ĉasado) de tigro; polica *rastado* de la kvartalo.

BATIDO — 1. *Batita* lakto; *kirlataj* ovoj. 2. Multe *trapasata* vojo; *eluzita* temo; porti *trivitan* robon. 3. *Ebenbatita* grundo. 4. *Knaloj* en la cilindroj. **BATIMENTO** — 1. *Frapado* de flugiloj; *batado* de la koro, pulso. 2. *Interferobato* de frekvencoj.

BATINA — *Sutano* de sacerdoto.

BATISADO — 1. *Bapto* de infano; la *baptoceremonio*. 2. *Bapto* de ŝipo.

BATISAR — 1. *Bapti* infanon Petro, je la nomo Petro; la patro *baptigis* sian filon Petro. 2. *Bapti* ŝipon je la nomo Cantuária; *fuŝmiksi*, *bapti* lakton per multe da akvo.

BATISMAL — La *bapta* ceremonio, kuvo; la *baptujo*.

BATISMO — 1. Dum la *bapto*; *bapto* de la infano; ricevi la *baptonomon* Petro. 2. *Bapio* de ŝipo; ricevi suan *aerbapton*, *fajrobapton*.

BATISTA — 1. *Batisto* (ŝtofo); *batista* tuko. 2. La *baptista* doktrino; la *baptistoj*.

BATISTĖRIO — 1. *Baptokapelo*, *baptejo*. 2. *Baptisterio* (ekster preĝejo).

BATOM — *Sminki* per *liprugigilo*; *lipfarbo*, *lipruĝumo*.

BATOTA — Fari *friponaĵon* en kartludo; *ludfriponaĵo*.

BATRAQUIO — *Batrako* (senvostulo).

BATUTA — 1. *Bastono*, *taktobastono* de la orkestrestro; konduki la orkestron per *taktobastono*. 2. Sub ies *ordonbastono*.

BAUNILHA — *Vanilo* (spicaĵo "vanilla planifolia"); *vanila* glaciaĵo.

BAUXITA — *Baŭksito* (Min.).

BÁVARO — La *bavara* popolo; la *bavaro* (log. Bavarujo).

BAZAR — *Bazaroj* de Bagdad.

BAZAREIRO — *Bazaristo* (vendas en bazaro).

BAZUCA — *Pafi* per *bazuko* (Mil.).

BDELIO — *Bedelio* (aroma rezino).

BE! — *Be!* (ŝafbleko).

BEATO — 1. *Beata* Mikaelo, la Ĉefanĝelo. 2. Vivi kiel *beatulo* (preskaŭ-sanktulo); la *bigotoj* (ekcesaj fervoruloj).

BEBE — *Infaneto*, *bebo*, *bubeto*, *suĉinfano*, *lulinfano*.

BEBEDEIRA — 1. Pro *ebriiĝo*; festi per *drinkado*; aranĝi *drinkfeston*. 2. Partopreni en *diboĉado*.

BEBADO — La *ebriulo*; fariĝi *ebria*; *ebriigintaj* uloj.

BEBEDOURO — *Trinkujo* (trogo por bestotrinkado); *trinkvazeto* de birdo; *trinkejo* (loko) por bestoj; ŝprucakva *trinkejo*.

BEBER — 1. *Trinki* akvon el glaso; don^t *trinki* al soifanto; *trinkigi* akvon al ĉevalo; *trinkigi* sian ĉevalon. 2. *Eltrinki* la tutan vinon; hundoj *langtrinkas*. 3. *Drinki* (malmodere) brandon; li *drinkadas* ĉiuvespere. 4. *Trinki* pro, je ies sano.

BEBERICAR — *Trinketi* la vinon.

BEBERRÃO — *Drinkulo*; *drinkema* viro.

BEBIDA — 1. Alkohola, glaciigita *trinkaĵo*. 2. *Drinkaĵo* (alkohola trinkaĵo).

3. Dum *trinkado* kaj manĝado.

BECA — Surhavi, surmeti juĝistan, profesoran, advokatan *talaron*.

BECABUNGA — *Bekabungo* (Bot. "veronica becabunga").

BECHAMEL — *Beŝamelo* (saŭco).

BECO — 1. Iri tra *strateto*; la strato finiĝas per *senelirejo*; eniri *sakostraton*. 2. Trafi *senelirejon* (ne trovi solvon); troviĝi en *situacio* sen eliro: *senelira*, *erara rondo*.

BEDEL — *Pedelo* de preĝejo, juĝejo, universitato.

BEDUĜINO — *Beduenoj* de Saharo.

BEGE (f.) — *Grizfava* koloro.

BEGONIA — *Begonio* (Bot. "begonia").

BEGUINA — *Begino* (monarĥino ne ligita per voto, en Belgujo, Frandujo).

BEGUME — La *begamo* (reĝino aŭ alt-rangulino en Hindujo).

BEHAVIORISMO — *Behaviorismo* (Fil.).

BEI — 1. La *bejo* (Tunizo). 2. La *dejo* (Alĝero, Tripolo).

BEIÇO — 1. Supra, malsupra *lipo*; *lip-ego* de azeno. 2. Pintigi la *buŝon*; fari *diklipon*, *lipgrimacon*; *paŭti*, *lipmieni* pro malkontentigo.

BEIJA-FLOR — *Kolibro* (Zoo. "trochilidae"); *muŝbirdo*.

BEIJAR — 1. *Kisi* iun sur la frunto; ili *interkisis*; *kisi* la manon al iu. 2. *Ŝmaci* (brue kisi). 3. Sunradioj *kisas* la supron de la monto; ondoj *kisas* la rokon.

BEIJO — Doni *kison* al iu; kovri iun per *kisoj*; premi *kison* sur ies frunton; *intersanĝi kisojn* kun iu. 2. Sendi *kison* al iu per la fingroj, mano; sendi perfin-gran *kison*; la *kiso* de Judaso.

BEIJOCA — Doni *kiseton* al patro.

BEIJOQUEIRO — *Kisema* junulo; la *kisemulo*.

BEIJU — *Oblatkuko*.

BEIRA — 1. *Rando* de telero, glaso, tablo; plenigi ĝis la *rando*. 2. Esti ĉe le *rando* de morto, frenezigo. 3. Sur ĉe la bordo de rivero, maro, abismo; sur la riverbordo, marbordo; *akvorando* de lago. 4. *Rando* de vojo; *rando* de la vojo; ĉevoja, *apudvoja* drinkejo; sidiĝi sur la *litrandon*.

BEIRADA — *Rando* de trotuaro, tegmento; *rando* de telero, taso.

BEIRAL — Tegmento kun 50 cm da *alero*; *antaŭtegmento* 50-cm larĝa; la *rando* de la tegmento.

BEIRA-MAR — Ĉemaraj urboj.

BEISEBOL — Ludi *bazopilkon*.

BELA — La *Dornoroĝeto* (rakonto).

BELADONA — *Beladono* (Bot. "atropa belladona").

BELAS-ARTES — *Belartoj* (arkitekturo, beletro, muziko, skulptado kaj pentrarto); gajni *belartan* konkurson.

BELAS-LETRAS — 1. Kulturi *beletron*. 2. Postuloj de *beletristiko*. 3. *Beletra*, *beletristika* konkurso.

BELCHIOR — 1. Lasi sian horloĝon al *lombardisto* (monpruntisto). 2. Aĉeti uzitan radiofonon de *brokantisto*.

BELDADE — 1. La *beleco* de tiu virino. 2. La *belulino*.

BELDROEGA — *Portulako* (Bot. "portulaca").

BELEMITE — *Belemnito* (Zoo.).

BELETRISTA — *Beletristo*.

BELETRISTICA — La *beletristiko*.

BELEZA — 1. *Beleco* de virino, artaĵo. 2. Amanto de la *belo*; koncepto de la *belo* en artoj. 3. Admiri *belaĵojn* de la naturo; la *naturbelajaĵoj*. 4. Salono de *beligado*; *beligejo*; *beligaĵoj* (kremaĵoj por la vizaĝo).

BELGA — La *belga* popolo; *belgo* (loĝ. Belgujo).

BELICHE — Dormi en *kajutlito*; *etaĝaj* litoj.

BÉLICO — 1. *Militaj* preparadoj; iri *militi* kontraŭ najbaro. 2. *Militema* karaktero, popolo.

BELICOSO — *Militema* popolo.

BELIGERANTE — La *militantaĵ* landoj.

BELISCAO — Fari *pinĉon* al infano; per dolora *pinĉado*; *pinĉmarko* sur la haŭto.

BELISCAR — 1. *Pinĉi* infanon; papago *pincis* al mi la fingron. 2. Vi nur *manĝetis*, *mordetis*; vi nur *fingrumis* la frandajon.

BELO — 1. *Bela* knabo, kanto, vazo. 2. Admiri, ami la *belon*. 3. Antono, la *Belulo*.

BEL-PRAZER — Laŭ via *bontrovo*, *placo*.

BELUCHI — La *beluĉa* popolo; la *beluĉo* (loĝ. Beluĉujo, Beluĉlando).

BELUCHISTANICO — La *beluĉa* popolo; la *beluĉo* (loĝ. Beluĉlando).

BELVEDER — Observi el *belvedero*, *belvidejo*.

BEM — 1. Paroli *bone*. 2. Senti sin *bone*; ĉio estas en *ordo*; ĉio iras *bone*, *glate*. 3. Glaso *tute plena*; vango *glate* razita. 4. Pasiĝi ne plena monato kaj... 5. Sciado pri bono kaj malbono; fari